

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago, № 9 (24), Septembro 2006

Adreso (provizora):
Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – d-ino Gertrude Novak
Kasisto – Karlo Gunn

Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;
Familio \$30; Regula \$20;
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.

Dues are needed for the routine expenses of our Society.

Check should be payable to:

The Esperanto Society of Chicago, and mailed to our **Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada, Chicago IL 60607**

Kunvenoj:

Membroj de La Ŝikaga E-Societo kunsidas la kvaran mardon de ĉiu monato en:
Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Bonvenon!

Gratulojn okaze de XXXV-a datreveno!

Karaj ŝikagaj esperantistoj, unu el la diroj, pro kiuj mi estas konata en Esperantujo, estas mia aserto, ke “la vera problemo de la Esperanto-movado en ĉi tiu periodo, ne estas la manko de Esperanto en Bruselo, sed la malforta movado en Usono”.

Tion mi daŭre diras, kaj pri tio mi daŭre estas konvinkata. En la nuna periodo ne estas dubo, ke la plej influa lando en la mondo estas Usono en ĉiuj kampoj de la vivo, inkluzive de kulturo. Se io iĝas moda en Usono, ĝi iĝas moda en Eŭropo la postan semajnon. La malo ne okazas. Do, se usona ĵurnalo parolas favore pri Esperanto, la efikoj sentiĝas tuj ankaŭ en Italujo. Mi ne ŝercas. La artikolo pri Esperanto en usona revuo post la Universala Kongreso en Gotenburgo estis represita en la itala en itala ĵurnalo (kaj en multaj aliaj tra la mondo). Sekve ni bezonas fortan movadon en Usono por influi la mondon.

La usona movado havas grandajn tradiciojn: de la vojaĝo de Zamenhof en la komenco de la pasinta jarcento al la posta restado de Lidja Zamenhof, kiun vi nun festos kune kun la 35-jariĝo de la oficiala registriĝo de la Esperanto-Societo de Ŝikago.

Mi facile komprenas la malfacilecon de via tasko en la lando, kie la plej internacia el la nun ekzistantaj lingvoj estas parolata, sed pro la kulturaj kialoj, kiun mi menciis antaŭe, estas esence, ke Esperanto progresu en Usono.

Komprenu bone, ke mi kiel internaciisto pensas, ke ĉiuj landoj kaj ĉiuj kulturoj estas samvaloraj, kaj sekve mi provas laŭ miaj eblecojn puŝi Esperanton ĉie tra la mondo, sed kiel realisto, kiu rigardas la mondan situacion mi estas devigata pensi, ke, se en ĉi tiu historia momento ĝi ne progresas en Usono, oni ne povas atendi decidan progreson en aliaj partoj de la mondo.

Pro tio ankoraŭ pli varme mi deziras al vi bonan labron kaj multajn sukcesojn! Vivu la Esperanto-Societo de Ŝikago!

Renato Corsetti, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio



UTILAJ RET-ADRESOJ:

UEA – Universala Esperanto Asocio
<http://www.uea.org>

Esperanto.Net – Home of a comprehensive FAQ list
http://www.esperanto.net/info/index_en.html

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course; toll free: 1-800-ESPERANTO (1-800-377-3726)
<http://www.esperanto-usa.org/>

Free Esperanto Course on Internet
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course
<http://www.mintex.demon.co.uk/espvi/angla/index.htm>

Internacia televido en E-o
<http://internacia.tv>

Reta senpaga enciklopedio
<http://eo.wikipedia.org>

Esperantic Studies Foundation
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

Pola Radio en Esperanto:
<http://www.wrn.org/audio/pol1.ram>

Sekvantaj kunsidoj:

26an de Septembro – ni festos nian Daton kaj memoros poeton Bill Auld

24an de Oktobro – 150-jara jubileo de I. Franko; estraran-proponoj por 2007, elektado okazos novembre

28an de Novembro – la elekta tago; temo estas anoncota kaj prelegonto estas serĉata (eble, ni parolos pri la “nigraj truoj” de nia E-agado)

**La 17an de Decembro
rapide proksimiĝas
Zamenhofa Bankedo 2007**

Nin salutas

Karaj gekolegoj! Nome de la **Esperanto-Ligo por Norda Ameriko**, mi salutas vin, gratulas vin, kaj donas al vi bondezirojn pro la 35a jara datreveno de via E-societo. Multan dankon por via aktiveco kaj bonega kunlaboro. Mi dankas vin aparte por via gastigamo, kiun vi montras al vizitantoj, kiuj trapasas vian urbon. Ni bezonas aliajn grupojn, kiaj la via.
Filipo Dorcas, prezidanto

Karaj anoj de la E-societo de Ŝikago, nome de la E-Sekcio de **La Brita Biblioteko** akceptu tutkorajn gratulojn okaze de la 35-a jubileo ĉe via Societo. Kresku ĝi kaj prosperu dum multaj jaroj! Vivu Esperanto kaj vivu interkompreniĝo inter homoj de diversaj nacioj! Sanon kaj personan feliĉon al ĉiu sociano kaj multege da energio por plua sukcesa agado.
Olga Kerziouk, sekciestro

Estimataj samideanoj! Okaze de la 35a datreveno de la oficiala registriĝo de la E-Societo de Ŝikago, bonvolu akcepti salutojn kaj bondezirojn de la **CO de ELNA**. Ni atendas kaj esperas ankoraŭ 35 jarojn (kaj pli) da agado kaj kunlaborado!
Don Harlow, direktoro

Nia akceptis salutojn ankaŭ de **Germana E-Asocio** (A. Emmerich), de E-kolektivoj el niaj ĝemelurboj – **Milano** (E. Rodari), **Gotenburgo** (A. Dagmarsdotter), **Toronto** (K. Toy), **Varsovio** (Irek).


Koran dankon al la salutintoj!

Ni funebras

(*Libera Folio*, 2006-9-12)) Forpasis **William Auld**, unu el la plej grandaj esperantaj verkistoj de ĉiuj tempoj. Li naskiĝis la 6-an de Septembro 1924, kaj forpasis matene la 11-an de Septembro 2006, kelkajn tagojn post sia 82-a naskiĝtago. La ĉefverko de Auld kaj de la esperanta literaturo, *La Infana Raso*, laŭ Gaston Waringhien estas “unu el tiuj tre malmultaj originalaĵoj en nia lingvo, kiuj egaliĝas kun la unuarangaj produktoj de la aliaj literaturoj”.

Forpasis Auld. La tago ŝajnas stranga
post vort' subita kaj silento sekva,
silento morta post ruliĝ' lavanga,
tamen serena, ĉar la blanko puras,
forpasis homo, kies bild' staturas
en niaj pensoj alte, vojogvide
por daŭre krei, same lingvofide.

Baldur Ragnarsson



ANONCO: Dezirantoj partopreni kunsidojn de E-grupo en Des Plains, kiuj okazos duan semajnon de ĉiu monato, bonvolu kontakti s-ron Grigorij Dolgin (847) 870-7605 aŭ dolgin@dls.net

De la tuta mondo kolektis por vi salutojn, anoncojn kaj malgajajn novaĵojn via obeema servanto (kaj redaktoro)



[araneoesp @ yahoo.co.uk](mailto:araneoesp@yahoo.co.uk)